

INFORMA BULTENO POR ĈEĤAJ ESPERANTISTOJ
ELDONAS PREPARKOMITATO DE ĈEA-KLERIGA INSTITUTO EN PRAHA

★ STARO

Oktobro 1968

N-ro 1

A L L A L E G A N T O J

Ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj, perdiĝe fine de la jaro 1951 sian regulan gazeton kaj baldaŭ (autune 1952) ankaŭ sian Asocion, kun novaj esperoj bonvenigis la ĉiĵaran politikan printempon en Ĉeĥoslovakio, kiu promesis esti ekstreme favoraŭ ankaŭ por iliĵaj klopodoj. Ne estas hodiaŭ kulpo de ŝtataj autoritatoj, au simple de ĉeĥoj kaj slovakoj mem, ke tiuj esperoj malkreskis dum la lastatempaj eventoj. Tion certe komprenos ĉiuj niaj amikoj, reciproke observante principon de internacieco kaj neutraleco kaj ne misuzante humanisman mision de nia komuna lingvo.

La lastaj okazintaĵoj sole prokrastis la konstituiĝon de la tutŝtata Esperanto-organizaĵo. Oni devos nun paŝon post paŝo en nenaturaj kondiĉoj retrovi manieron, kiel daŭrigi la vojon irotan.

Ni adaptiĝas al provizora organiza formo kaj aperigas paralele kun "Esperantisto Slovaka" periodaĵon por samideanoj en la ĉeĥaj landoj. Per nia gazeto, kiu aperas apud la neregulaj "Informoj de CSEK" ni volas precipe unvigi la esperantistaron enlande kaj establi pli vastajn ligojn kun la eksterlanda Esperanto-movado, speciale kun ties reprezenta organo, Universala Esperanto-Asocio.

Nia ĉefa tasko estu serĉi laŭeble plej ĝustan vojon por helpi la kreon de organiza kaj ideologia bazo de nia venonta ekzistado.

La Redakcio

Přípravný výbor ČES

Na mimořádném zasedání ČSEV (česká část) dne 13. 7. t. r. v OÚ v Praze byl ustaven samostatný přípravný výbor Českého esperantského svazu ve složení:

Tomáš Balda, Vladimír Bořánek, Drahomír Kočvara, Jaroslav Mařík, Pavel Sittauer, ing. František Sviták, Josef Vitek, Josef Vondroušek.

Přípravný výbor Českého esperantského svazu předložil 16. října t. r. návrh svých stanov ministerstvu vnitra ke schválení. Pokud jde o svolení ustavujícího sjezdu, bude možno rozhodnout až podle výsledků úředního jednání na MV.

Organizační řád ČES, vypracovaný z pověření předsednictva ČSEV dr. Půmprem, byl po projednání na 2. plénu 18. 5. t. r. v Brně znovu projednán na uvedeném mimořádném zasedání ČSEV a schválen v konečném znění.

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA MEMSTARIGITA ! - La 12-a de aŭgusto 1968 restos memorinda doto por la esperantistoj de nia ĉefurbo, Tiun tagon la Esperantista Klubo en Praha estis rekonita de 1 urbaj autoritatoj kiel memstara organizaĵo, siavice la unua en la lando. Dum longaj jaroj ĝi funkciis kiel interesrondeto de la Parko de Kulturo kaj Ripozo de Julius Fučík. La 27-an de septembro okazis plenkunsido de la Klubo, kiu elektis novan estraron kun D-ro Rudolf Horský kiel prezidanto. La oficiala aprobo de la Esperantista Klubo en Praha povas esti konsiderata simptomo por memstarigo de tutŝtata organizaĵo kiel konsekvenco de la demokratiigo en Ĉeĥoslovakio. Nova poŝtadreso: Esperantista Klubo en Praha, pk 1069, Praha 1

ATENTU! De la 14-a de oktobro la klubaj kunvenoj ne plu okazas vendrede, sed lunde je la 7-a horo.

---o---o---o---o---

"La Esperantista movado en Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko - precipe ekde la komenco de la nuna jaro - havas tre favorajn kondiĉojn. La movaĵo en nia lando disvolvis en lastaj jaroj viglan agadon. Inter alie kreskis gravaj sekcioj junulara kaj fervojista, kiuj nombras po mil membroj. Cijare ni laboras fervore por la refondo de memstara Esperanto-organizaĵo laŭ federacia principo. Oni preparis statutojn de la landaj Ĉeĥa kaj Slovaka Asocioj, kiuj kunigos en la tutŝtata Ĉeĥoslovaka Esperanto-Federacio. Ĝi klopodos fariĝi, espereble jam venontjare, plenrajta membro de UEA."

(Salutparolo de Mikuláš Nevan, reprezentanto de CSEK, ĉe la inaŭguro de la 53-a U. K. de Esperanto)

REZOLUCIO

akceptita de la 53-a Universala Kongreso en Madrid

La 53-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Madrid de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 1968, aŭdinte prelegon pri la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj diskutinte en la Unua Generala Kunveno de la Kongreso Raporton pri la Kulturaj Rajtoj kaj Lingva Diskriminacio,

1. rekomendas al la Landaj Asocioj kaj al la Landaj Sekcioj de Fakaj Internaciaj Organizaĵoj apartenantaj al Universala Esperanto-Asocio, instigi siajn Registarojn akcepti, konforme al la respektivaj konstituciaj proceduroj, ĉiujn konvenciojn rilatantajn al la Homaj Rajtoj, por kiuj ili voĉdonis, precipe la Pakton pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, la Pakton pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj kaj la Fakultativan Protokolon al tiu Pakto;

2. konstatas, ke lingva diskriminacio, nome malegala traktado de lingvoj, manifestiĝas kaj sur internacia nivelo (ekz. la laboraj lingvoj en rilato al la oficialaj, la oficialaj rilate al ĉiuj aliaj) kaj en kadroj de diversaj ŝtatoj, precipe koncerne la lingvojn de minoritataj etnaj grupoj, kio en kelkaj kazoj atingas la formojn de kultura genocido. Kiel ĉiu alia diskriminacio, ankaŭ la lingva esprimiĝas ĉefe en du formoj: objektiiva (kaŭzita de la fakto mem de multlingveco) kaj subjektiva (antaŭjuĝoj pri la diskriminacitaj lingvoj kaj pri la kulturaj valoroj kreitaj en ili);

3. esprimas sian konvinkon, ke la lingva problemo en la hodiaŭa mondo, inkluzive la traktatan aspekton de tiu problemo, povas esti efike kaj juste solvita nur per adekvata adopto de la Internacia Lingvo (Esperanto);

4. petas la Centron de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingva Problemo (London-Rotterdam) dediĉi apartan atenton al la lingva diskriminacio kaj publikigi dokumentojn, studojn kaj artikolojn pri tiu demando;

5. komisiigas la Estraron de Universala Esperanto-Asocio vaste diskonigi tiun ĉi Rezolucion kaj komuniki ĝin al U. N., U. N. E. S. C. O. kaj aliaj internaciaj institucioj, kiel ankaŭ al la Ŝtatoj-Membroj de U. N. kaj U. N. E. S. C. O. kun la peto pri konsidero de ĝia enhavo.

Por la 53-a Universala Kongreso de Esperanto

La Prezidentaro:

Prof. D-ro Ivo Lapenna, Direktoro E. L. M. Wensing, Direktoro E. Carlen, S-ro G. Becker, Prof. D-ro M. Sancho Izquierdo

Ivo L a p e n n a : Flegi ĉion pozitivan...

(kelkaj fundamentaj tezoj ellaboritaj surbaze de la Inaŭgura parolado de la 53-a U. K. de Esperanto - esenca parto)

Internacilingva problemo

La lingva situacio en la mondo kaj la evolutendencoj kiujn ĝi entenas, unuflanke, la aktuala pozicio de la Internacia lingvo kaj ĝiaj perspektivoj por la estonto aliflanke, postulas klaran difinon de la rolo de la Esperanto-organizaĵoj kaj de la laborprincipoj de iliaj gvidaj instancoj.

1. Kiel ĉiuj seriozaj observantoj antaŭvidis jam antaŭ multaj jaroj, la lingva problemo en la mondo devis necese komplikiĝi pro la antagonismo inter la kreskantaj bezonoj de komunikado kaj la lingvodiverseco, kiu obstaklas la kontentigon de la bezonoj. Tio kondukis al la nuna absurde neracia stato, karakterizita de tensioj kaj diversformaj prilingvaj luktoj sur internacia kaj nacia niveloj. En ĉiuj siaj aspektoj la lingvo-problemo konstante akriĝas kaj tial ĉiam pli impete postulas radikalan solvon.

2. Science analizi sociajn fenomenojn, inkluzive la pritraktatan, signifas rigardi ilin ne statike, sed dinamike; la dinamismo sur la lingva kampo klare indikas, ke la evoluprocezo direktiĝos pli aŭ malpli frue, sed tute certe al la solvo por kiu ni plejdas, ĉar tiu solvo prezentigas kiel sintezo de la konfliktaĵoj interesoj de naciismo kaj internaciismo, de la firma volo de la popoloj kaj etnaj grupoj konservi siajn respektivajn lingvojn kaj siajn identecojn, unuflanke, kaj la postulatoj de mondvasta komunikado sur ĉiuj niveloj aliflanke.

3. La ekzistado mem de la Esperanto-organizaĵoj, kaj entute la laboro por la Internacia lingvo en kia ajn formo, havas sencon nur se la du supraj premisoj estas ĝustaj. Por mi la solvo de la lingvoproblemo per Esperanto, kun ĉiuj pozitivaj kromefikoj, estas afero ne de espero aŭ de naiva fido, sed de firma konvinko bazita sur objektiva analizo de faktoj. Foresto de tia konvinko estas fonto de duboj kaj ne malofte eĉ de defetismo.

4. Por rapidigi la solvon necesas ke la rimedo estu kiel eble plej ellaborita, maksimume perfekta, tiel ke en ĉiu momento ĝi plene tangu por la samtempaj bezonoj de internacia komunikado en ĉiuj sferoj de la vivo. Tio signifas, ke necesas daŭre evoluigadi la lingvon, praktike ĝin uzadi, riĉigadi ĝin per nova kultura enhavo, sed samtempe konservi ĝian absolutan unuecon. Tial, la plej rigora observado de la decidoj kaj rekomendoj de la Akademio estas antaŭkondiĉo por ĉia ajn sukcesa laboro por la Internacia Lingvo.

Rolo de U. E. A.

5. En 60 jaroj de sia ekzistado U. E. A. evoluis al forta internacia asocio, apartenanta tutcerte al la centoj de la plej gravaj el inter ĉ. 3 000 nun ekzistantaj en la mondo. Tial la tasko de ĉiuj personoj parolantaj la lingvon estas fortikigi U. E. A. ĝis maksimumo, por ke ĝi povu kiel eble plej efike plenumi sian rolon. Kreado aŭ apogado de paralelaj organizaĵoj aŭ instancoj kun esence samaj idealoj, sed sen realecaj perspektivoj, sen la bezonataj homaj fortoj, materiaj rimedoj, reprezenta karaktero kaj adekvata prestiĝo, disrompas la fortojn, kreas konfuzon kaj, en la lasta linio, malutilas al la afero mem de la Internacia lingvo.

6. En sia nuna organiza formo UEA estas pli ol ampleksa por ebligi al ĉiu Esperanto-organizaĵo kaj al ĉiu serioza aganto por la Internacia lingvo esprimigi kaj efike kunlabori.

7. UEA kiel tia estas politike neutrala, sed tio neniel implikas, ke ĝiaj membroj estus en kiu ajn senco senigitaj de sia rajto havi proprajn politikajn, filozofiajn, religiajn au aliajn konvinkojn. UEA ne estas, nek lau sia Statuto povas esti, neutrala koncerne kiun ajn aspekton de la lingva problemo, inkluzive la politikan, au rilate kiun ajn formon de diskriminacio kaj persekutojn kontraŭ la Internacia lingvo au la Esperanto-organizaĵoj.

8. UEA estas nek ŝtato, nek federacio au konfederacio de ŝtatoj. Tial, apliki al ĝi, au al la asocioj el kiuj ĝi konsistas, la ideon de suvereneco, au kiun ajn alian principon de ŝtata organizo estas esence erara kaj misgvida. UEA estas kultura organizaĵo libervole formita por progresigi la celojn formulitajn en la Statuto, kaj ĝi povas esti komparata nur al similaj kulturaj, senprofitaj privataj asocioj.

9. La finaj celoj kaj la aktualaj taskoj de UEA estas difinitaj en la Statuto, Regularo kaj Laborplano. Ĝiaj nunaj agadoj konsistas el kvin ĉefaj grupoj: I/ disvastigo de la lingvo per dokumentado kaj informado, II/ kontribuo al kultura riĝigo de la lingvo, III/ instruado, IV/ kreo kaj evoluigo de praktikaj servoj, V/ eksteraj rilatoj. Konservi kaj evoluigi la nunajn agadojn, krei novajn en la kvin ĉefaj branĉoj, signifas progresigadi la lingvon.

10. Pro la tuta karaktero de UEA, kaj por ke ĝi povu efike plenumi siajn taskojn, ĉiuj ĝiaj partoj, ĉiuj instancoj kaj funkciuloj devas esti rigardataj kiel same gravaj por la progresigo de la tuta. Tio signifas, ke al profesiaj laborantoj en la Esperanto-organizaĵoj ne estas aplikeblaj la normoj kutime aplikataj al la oficistoj au laboristoj de industria kaj komercaj entreprenoj.

11. La Statuto kaj Regularoj klare difinas la kompetentecojn de diversaj organoj kaj la manieron, lau kiu estas farataj la decidoj. Tiu demokrata maŝinaro ebligas ĝisfundajn diskutojn en la kompetentaj organoj pri ĉiuj proponoj kaj aliaj demandoj, sed ĝi ankaŭ postulas konsciencan plenumon de la faritaj decidoj. Malatento de tiu principo facile kondukas al burokratismo au al malkonkordoj.

12. Membreco en la Komitato, Estraro au aliaj organoj ne estas ia honora ofico, sed labora funkcio. Neniu devigas kiun ajn akcepti membrecon en iu organo, sed se oni akceptas iun funkcion au taskon, oni samtempe akceptas moralan devon precize plenumi ĝin.

13. La C. O. estas la teknika-administra bazo de la tuta laboro. Se ĝi ne funkcias glate, ĉiuj aliaj agadoj devas lami.

Nia respondeco

14. La laboro por la Internacia Lingvo estas nek simpla, nek facila. Ĝi postulas de ĉiuj libervolan disponigon de tempo kaj energio. De la karaktero de ilia laboro grandparte dependas ne nur la atingoj au malsukcesoj, sed ankaŭ la pozitiva, indiferenta au negativa imago pri Esperanto en la publika opinio. Tio ekspikas kial en kelkaj regionoj au medioj la Esperanto-organizaĵoj estas respektataj kaj la agado por la Internacia Lingvo apogata au sekvata kun simpatio, dum en aliaj ili estas bagateligitaj au eĉ primokataj. Malfeliĉe, ĉiam troviĝis ankaŭ individuoj, kiuj pro kompleksaj psikologiaj kaŭzoj elvivigadis en detruado de tio, kio jam estis pene konstruita. Preskau senescepte la plej aktivaj kaj sukcesaj laborantoj fariĝis viktimoj de sengustaj atakoj... Sen definitiva sanigo de tiu bedaurinda stato ne estas eble atendi multe pli grandajn sukcesojn. La homo estas nia plej granda valoro. Necesas multe pli da respekto kaj por li kaj por lia laboro.

15. La supraj tezoj, kvankam abstrakte formulitaj, estas bazitaj sur multjaraj tre konkretaj personaj spertoj, kompletigitaj per studo de historiaj eventoj en la Esperanto-Movado antaŭ 1928. La celo estis nek laudi, nek riproĉi, sed indiki la irotan vojon, kies direkto altrudiĝas per si mem: flegi kaj fortikigi ĉion pozitivan, senkompate liberiĝi de ĉiuj negativaj aspektoj. Ne estas tempo por prokrasti aŭ rezignacie atendi. Necesas agi tuj kaj ĝisfunde, ĉar la cirkonstancoj en la mondo rapide maturiĝas por la solvo de la lingva problemo kaj paralele kreskas la ŝancoj por ĝeneraligo de la uzo de Esperanto. De UEA, de ĉiuj organizaĵoj apartenantaj al ĝi, de ĉiuj unuopuloj dependas, ĉu ni scios ekspluati tiun ĉi unikan okazon, aŭ ni permesos, ke ĝi preterpasu nin.

o - o

"ĈIO, KIO KUNIGAS HOMOJN, ESTAS BONA,

CIO KIO DISIGAS ILIN, ESTAS MALBONA"

(Lev Nikolajeviĉ Tolstoj al Romain Rolland en oktobro 1887)

o - o

xxx 54-a Universala Kongreso en Helsinki 26. 7. - 2. 8. 1969 xxx

Ni atentigas interesulojn, kiuj emas viziti la kongreson, ke CSEK ne povas peri aliĝon kaj pagon de kongreskotizoj, eventuale aliajn reĝtadkostojn por la 54-a Universala Kongreso en Helsinki. Lau niaj ĝisnunaj informoj restas nur jenaj eblecoj:

- 1/ Havi en okcidentaj landoj amikon, kiu povus (kontraŭ difinita rekompenco!!) pagi kotizon (70,-- resp. 50,-- ned. guld. por MA de UEA) kaj sendi al vi personan inviton al senpaga restado en Helsinki.
- 2/ Peti ĝustatempe (versajne tuj post la Nova jaro) ĉe koncerna filio de la Stata Banko necesajn valutojn por la vojaĝo kiel privata turisto.
- 3/ Uzi la servojn de vojaĝoficejo kiel privata turisto.

Noto: Ni nepre ne rekomendas almozpeti sen bonaj personaj rilatoj!

o - o

Kiel agi kaj kiel ne...

Se ni volas enkonduki Esperanton en la ĉiutagan praktikan vivon - kiu ege bezonas ian facilan kaj klaran helplingvan sistemon - ni devas plejeble rapide ŝanĝi la metodojn de nia informado.

Ni konvinku pri la utilo kaj neceso de Esperanto niajn nuntempajn sciencistojn, niajn intelektulojn, niajn gvidantojn en la publika instruado, niajn estrarojn de internaciaj entreprenoj kaj ni instigu niajn elstarajn - bedaŭrinde tre malmultajn - sciencajn aŭ alikampe eminentajn esperantistojn, ke ili aktive kunlaboru ĉu en la kompilado de modernaj fakaj terminaroj ĉu en la verkado de altnivelaj sciencaj libroj kaj fakstudaĵoj.

Per la kantado de la himno, la blinda adorado de la Majstro, per la publikigo de poemaroj, naciaj aŭ internaciaj fuŝbultenoj kaj organoj, per verdaj steloj kaj mil aliaj "verdaĵoj" ni atingis fakte nenion dum okdek jaroj. Se ni volas savi la lingvon de malrapida, sed certa pereco, ni ŝanĝu niajn metodojn kaj ni faru el Esperanto taŭgan instrumenton por ĉiuj modernaj internaciaj kontaktoj sur ĉiuj praktikaj terenoj de la nuna vivo.

(E. L. M. Wensing, Direktoro de E. K. I. en "Esperanto-Gazeto

N-ro 21/III/6)

JAK SE BUDEME ORGANIZOVAT?

oooooooooooooooooooooooooooo

Stručný přehled výsledků ankety Sekce mládeže ČSEV ze dne 18/4/68

oooooooooooooooooooooooooooo

1. Ze 120 obeslaných EK odpovědělo k datu uzávěrky ankety (30/6) 28 EK, z toho 3 EK ze Slovenska (na Slovensku je registrováno 24 EK). Členská základna uvedených 28 EK představuje 1 007 členů z celkového počtu evidovaných 3 441, tzn., že výsledek ankety lze považovat za průzkum mezi cca 1/3 členské základny.
 - a) Vznik samostatného esperantského svazu podporuje (požaduje) všech 28 EK.
 - b) Částka členského příspěvku je velmi různá; pro kategorizaci se vyslovilo 8 EK, 7 EK navrhuje Kčs 20,--, 4 EK navrhuje Kčs 25,-- a 2 EK navrhuje Kčs 30,--.
 - c) Velmi se různí názor na to, co by měl členský příspěvek obsahovat.
 - d) Pro hromadné platby prostřednictvím EK se vyslovilo 14 EK; platit Svazu přímo složenkou navrhuje 7 EK, nevyjádřilo se 7 EK.
2. Pro federativní uspořádání esperantského hnutí v Československu se vyjádřilo 10 EK. Z odpovědí však vyplývá, že mnohé EK nemají jasnou představu o tomto problému. Pro celostátní organizaci mluví 14 EK, ale ani tato kategorie podstatně věci nerozumí. Názor nevyslovil 1 EK, slovenské EK (3) jsou pro federaci.
3. Podzim 1968 je všeobecným požadavkem termínu konání celostátní konference esperantistů. Jako místo uvádí 23 EK město Brno, ostatní Olomouc, Gottwaldov, Prahu a j. Pro účast pouze volených delegátů je 8 EK, 6 EK žádá účast všech zájemců, 14 EK zůstalo bez vlastního stanoviska.
4. S navrženým volebním klíčem vyslovila souhlas převážná většina (22 EK). Ostatní navrhuje malé úpravy.
5. Některé EK navrhuje své čelné funkcionáře, jiné rozhodnou, až bude věc "aktuální".
6. Za zdroje příjmů navrhuje některé EK celou řadu možností. Jsou k dispozici na požádání. Stejně tak o možnostech finančního a materiálního zabezpečení mluví některé EK velmi podrobně.
7. Za zdroje pro financování časopisu považuje 8 EK předplatné. Ostatní (20 EK) se nevyjádřily.
8. Pro celostátní časopis hlasuje 25 EK, 2 EK navrhuje časopisy národní, 1 EK se nevyjádřil; měsíčník navrhuje 21 EK, 2 EK doporučují časopis vycházející 10x ročně a 5 EK má jiné návrhy. Názvů je několik variant: Esperantista (3), Československa Esperantisto (8), Progreso (4), Esperantista Revuo (2) a j.
9. Jmenovité návrhy na obsazení funkcí v celostátních orgánech poslalo 11 EK, ostatní EK se nevyjádřily.
10. Vztahy k dosavadním zřizovatelům EK jsou hodnoceny jako: dobré (18 EK), výborné (1 EK), špatné (1 EK), nevyjádřilo se 10 EK.

Poznámka:

Zpracovatelé ankety doporučují využít výsledků této ankety při posuzování a zpracování návrhů dalšího rozvoje esperantského hnutí v Československu, zejména při řešení organizačních a edičních záležitostí.

V době po uzávěrce a zpracování ankety došly odpovědi ještě 2 EK.

Esperanto do služeb československého
skautingu
(provolání Junáka)

Při výchovném odboru Junáka byla utvářena esperantská skupina, která si vzala za úkol šířit myšlenku esperanta v řadách junácké mládeže a prostřednictvím esperanta navázat styky se skauty v zahraničí. Prostřednictvím této esperantské skupiny bude možno organizovat v junáckých oddílech a střediscích kurzy esperanta a vytvářet junácké esperantské kroužky. Junáci - esperantisté budou moci prakticky využít esperanta na mezinárodních skautských Jamboree.

Esperantská skupina chce zavést v časopise Junák kurs esperanta a pravidelně uveřejňovat esperantskou hlídku. V příštím roce bude svolán junácký esperantský sraz a počítá se také s uspořádáním junáckého esperantského tábora.

Esperantská skupina obnovila činnost národní sekce Skautské esperantské ligy a jejím prostřednictvím naváže kontakty se skauty-esperantisty v zahraničí, t.j. vzájemnou korespondenci, výměnné akce, přátelská setkání apod.

Při šíření esperantské myšlenky mezi junáky počítá Esperantská skupina výchovného odboru Junáka s pomocí stávajících esperantských kroužků v jednotlivých místech.

Junáci a skautky - esperantisté a všichni, kdož máte zájem o esperanto a chcete se stát členy národní sekce Skautské esperantské ligy, zašlete své přihlášky na adresu :

Esperantská skupina výchovného odboru Junáka, Praha 3 - Vinohrady,
Čapajevovo náměstí č.6. (K přihlášce uveďte své jméno, data narození,
zaměstnání a plnou adresu).

- x - x - x - x - x - x -

RECENZO

Ján K á d o š: MOHAJRA FLEJDO

/Grotesko en 2 aktoj. El la slovaka tradukis Eduard V. Tvarožek, redaktis L. Kiss/

Jen aperis en Esperanta traduko la sukcesa teatraĵo de Ján Káčoš, kiu ricevis premiojn en konkursoj hejmlandaj kaj internaciaj kaj atingis jam tradukojn en nau lingvoj.

La aŭtoro en sprita kaj skua tragedia konfrontado de malsamkarakteraj edzo kaj edzino prezentas al ni kuvivon en tridekjara geedzeco de du homoj sufokataj de malamo, malrespekto, malkompreno. Ili, senprospera advokato, sadisma despotoj ŝi, teneta, mildanima, submetigema sklavinio, suferanta virino.

Per rafinita kontraŭpunkto de animaj maloj en straciaj dialogoj disvolviĝas antaŭ ni tragedia disfalo de homeco, diskauterizata de egoismo, kruelo, stulta malkoleremo kaj despota regemo. La teatraĵo, nomata de aŭtoro grotesko, estas verdire aktuala kaj avertanta kurba spegulo ne nur de unu homa parto, sed eĉ de homa socia.

La traduko de E. V. Tvarožek estas glata kaj bona. Tamen antaŭ prezento sur la scenejo oni korektu plurajn preserarojn kaj tri-kvar lingvajn malkorektaĵojn. Ekzemple oni anstataŭigu negustajn aŭ arkaikajn p i a n i ŝ o (p. 3), s a k e o (p. 48), v i p e r o (p. 56, 57) per respektivaj p i a n o, j a k o, v i - p u r o.

La 61-paĝa libreto estas rotaprinte multobligita ĉe DILIA, Bratislava en junio 1968. Prezo ne indikita.

u p o z o r n ě n í

Prosíme čtenáře a předplatitele Zpráv ČSEV, aby z hlediska neregulérnosti při jejich vycházení, považovali toto a nejbližší letošní čísla STARTO za určitou kompenzaci. S vydáváním našeho časopisu jsou ovšem spojeny určité náklady, k jejichž úhradě nemáme prozatím dostatek prostředků. Budeme proto s díky kvitovat dobrovolné dary na tiskový fond, jež lze pokázat složenkou in blanco na účet: 219 026

11-3001-8

St. spořitelna Praha 1

xx

Ni akceptas senpage adresojn de ĉiuj eksterlandaj esperantistoj, kiuj emas korespondi kun ĉeĥoslovakaj samideanoj. Enlandaj interesantoj sendu kun via anonceto, en kiu indiku vian aĝon, profesion ks. ankaŭ 5-kronan kotizon (en poŝtmarkoj) al la adreso de redakcio. Oni estas petataj laueble represii tiun ĉi informon.

xx

PODZIMNÍ KURSY ESPERANTA
pro začátečníky i pokročilé organizuje Klub esperantistů v Praze, Reznická 17, Praha 1. Zájemci, hlase se každé pondělí na schůzích Klubu mezi 19 - 21 hod.

xx

B l a h o p ř e j e m e
a držíme palce redakci obnoveného Esperantisto Slovaka, do jehož čtvrtého čísla jsme nahlédli v těchto dnech.

xx

V Ý Z V A ! ! !
Aby se náš časopis mohl stát pojátkem, tribunou a rádcem, k tomu potřebuje nezbytně Vaši pomoc. Žádáme proto všechny, kdo mají zájem o pravidelnou a trvalou spolupráci, aby nám pomohli vytvořit síť

stálých dopisovatelů v krajích a v okresech. Odborným sekcím rádi otiskneme aktuální informace. Všechny konstruktivní a seriózní příspěvky pomohou zpestřit obsah časopisu a jsou proto vítány. Zasílejte nám své dopisy. Pište o své práci!!!

xx

Nabídka esperantských pomůcek

- informační brožura Oldřicha Kníchal "Co nevíte o esperantu" formát A5, 50 stran, Kčs 4,--
- plakát pro E-kursy, formát A3, dvoubarevný, kus Kčs 0,50, nejmenší odběr 20 kusů.
- propagační turistická ilustrovaná publikace v esperantu "Invito al Ĉeĥoslovakio", 100 stran, formát A5, cena Kčs 13,--
- separát z časopisu PACO "Francouzští impresionisté v Národní galerii v Praze", 10 stran, 8 reprodukcí, cena Kčs 3,--
- esperantské odznaky vydané k akci "Týden mezinárodního přátelství" třibarevný, sběratelská kuriozita (!), cena režijní Kčs 5,--
- diplomy pro absolventy E-kursů, formát A4, cena za ks Kčs 0,25.
- vkusné barevné plakáty a prospekty vydané u příležitosti "TMP Plzeň", vhodný výstavní a propagační materiál, pro esperantské kroužky zdarma

xx

MIMORÁDNÁ PŘÍLEŽITOST.....

Zájemce o odběr STARTA upozorňujeme, že tento časopis zasíláme automaticky všem předplatitelům "Zpráv ČSEV". Novým předplatitelům zašleme i kompletní ročník 1967 za nezvýšenou částku Kčs 16,--. Složenku k úhradě předplatného zašleme na požádání.

.....

S T A R T O - informační list

českých esperantistů

Vydává Přípravný výbor ČES - Osvětový ústav v Praze. Řídí redakční rada: Jaroslav Mařík, ing. František Sviták, Ivo Železný, Mikuláš Nevan. Grafická úprava titulní strany Jan Nevan. Odpovědný redaktor Oldřich Kníchal. Adresa redakce a administrace: Blanická 4, Praha 2 (Osvětový ústav - ČSEV).

BELETRA PAĜO

Marie Kudeřiková

FRAGMENTOJ DE L'VIVO

(el la lasta letero)

La 26an de marto 1943

Vendredo

- o - o - o -

Hodiaŭ, la 26an de marto 1943 je la sesa kaj duono vespere, du tagoj post la gisvivo de mia 22-a naskiĝtago, mi lastfoje elspiros. Kaj tamen gis la lasta momento. Vivi kaj kredi. Ĝiam mi havis kuragon por vivi, sed ne perdas gin ankau vid-al-vido al tio, kio en homa parolo nomigas morto.

Mi volus premi je mi vian tutan ĝagrenon, doloron. Mi sentas forton porti ilin por vi, sopiron - forporti ilin kien mi. Mi petas, petas, havu gin ankau, ne suferu, ne ploru. Mi amas vin, mi estimas vin. Ĝiam allokis flugiloj al mi, kiam mi legis viajn vortojn. Vi faris ĝion, kio estas nur ebla en homaj kaj amantaj povej. Neion al vi riproĉu, ĝion mi scias, ĝion mi sentas, ĝion mi legas en viaj koroj.

- o - o - o -

Mi ne timas la estontan. Eĉ kiam mi pekatis kaj faris maljustaĵon, ĝiam mi sentis instigon al bona, nobleco, honesto. Mia tuta vivo estis belega. Arda, kredanta, batalanta kaj venkanta. Vi estis gis bona. Vi, mia panjo - ŝafeto, mia patro, mia fratino kaj Joĉjeto, mia avinjo kaj onjo. Vi ĉiuj, kiuja mi amis, kaj kiuja mi ŝatis. Amataj homoj, kara vivo kaj mondo.

Mi surĝenuigas antau vin, vi, la plej kara de mia vivo, mi petas vian amon kaj pardonon. Mi petas pardonon por ĉio kaj ĉiujn, kiuja mi iam vundis. Serĉante homon - idealon, mi ofte erarigis, nur en la koro restis la kredo kaj en la okuloj sopiro. Mi kisas viajn manojn kaj dankas el tuta mia koro, el tuta mia animo, en la plej grava momento de mia vivo. Mi ne surverŝas ilin per larmoj, ne, mi surkovras ilin per ridetoj de amo, de danko kaj interpacigo kaj mi petas ankau pri rideto. Kiam sur la lipoja al vi, panjo kaj paĉjo, al vi, miaj amataj kabinetoj kaj etulo, al vi, miaj avinjo kaj onklistoj. Gojigu vin, amu vin. Salutu. Mi salutas kaj deziras al ĉiuj profunde kaj sincere homan feliĉon.

- o - o - o -

Ni detruis la muron, kiu starigis inter nin, kaj ni staras vizag-al-vizage, mano en mano, koro en koro, menso en menso. Ne iradu, mi petas, fimbri al la tombe de mia memoro. Sur gi elkresku ĝiam nur gojo kaj rideto, konsolo. Mi petas, ke gi nelamigu la volon al la vivo, sed plifortigu kaj kuragigu gin.

Jus alvenis la pastro. Ni interparolis de koro al koro, kiel homo al homo. Mi priesploris denove en la plej grava momento ĝion, kio formas min mem, kaj trovis gin vera. Ne timu pri mi. La ideo de mia justeco estas pura kaj majesta, gi sukcesos, ĉar alportos bonon al la homoj. Ne ploru, ne malesperu, sed vivu, amu vin kaj gojigu. Tiam da fojoj mi ripetis la vortojn de amo, ke scius obtuze, se la graveco de la momento ne donis la plej altan rajtigojn al mi.

- o - o - o -

Mi jam plurfoje skribis al vi, ke la homoj ĉirkaŭ mi eble sentis, ke mi volas kaj deziras nur la bonon, ili repagis per la samo. En la silento de la momentoj mi multe pensadis, multe rememoras. Iam ŝajnis al mi, ke estas neviroce bedaŭri. Hodiaŭ mi humile, arde bedaŭras ĝion, per kio mi iun ajn vundis. Mi bedaŭras ĝion, malbona kaj erara, mi gojas pro la bona.

Ĉu vi rememoras mian abiturientan ekzamenon ? Vi memoras, ke mi neniam tiris kaj neniam senti teruron pro ekzameno, en neniu vivsituacio ? Timo, tremo, timemo, angoro ĉiam forfluis en la decida momento, en kiu restis jam nur firmeco, decidemo kaj rekta videmo. Simile estas eĉ hodiaŭ, kredis ĝin. Mi ja batalis kaj silentigis sovagan maltrankvilon de necerteco, de plendo, doloro kaj sepiro... (elstrelite de la cenzuro) ... al la memoro mi postlasas peseton de tiu ĉi persistemo.

Ĉio ĉesis, eksilentis, proksimiĝas nur tiu decida momento. Ĉu vi estas hejme ? Ĉu vi revenas el la vinberejo, el la gardeneto, el la abelejo ? Mi estas kua vi, ĉu vi sentas ? Mi volus meti miajn manojn kiel ŝildon sur viajn korojn por mildigi la baton, kiam kaŭzos al vi mia sciigo. Mi estos tiel ĉiam kua vi, mi ne forlasos vin.

Mi skribas la tutan posttagmezon. Mi devas interrompadi pro la pritrakto de la lastaj formalajoj.

Neniel kompatu min, ne ploru. Mi scias, ke vi surpronus tion volonte anstataŭ mi, sed ne, mi havas forton por porti mian sorton, mian vivon, kiuj estis ankaŭ mia verko. Tio estas nur necesaj, neeviteblaj kaŭzoj.

Ne alvenis ankoraŭ al mi via bondeziro al mia naskiĝtago, sed mi scias, kua kia ano vi rememoradis, kiam vi al mi kaj al vi mem deziris. Ĉion mi scias. La memoraĵoj je mi lokigu tien, kie mi povos aŭdi la pulsbaton de la vivo. De kie mi rigardos viajn paŝojn por atentigi, averti, gvidi. De kie mi povos ĝoji kun vi, vin konsoli, kuragigi.

La pastro ankoraŭ venis por ekrigardi.

Mi amas, mi foriras kun kredo, kun firma kredo.

Via amanta filino

Marie Kudeříková

Saluton al ĉiuj. Pardonon. Dankon. Amon. Mi estas kun vi. Dankesprimojn kaj amon al vi.

M.K.

Mi foriras sen timo.

La harojn mi mem plektis. Mi sendis per ili sciigon kaj kison. Ili estos alpakitaj al miaj aĵoj, kiuj postulu.



Marie K u d e ř í k o v á (1921-1943) estis junulara funkciulinino en Brno, arestita de nazioj en 1942. Kiam ŝi komencis en la Breslaŭa malliberejo skribi siajn leterojn kaj sekretajn rimarkojn, al kiuj ŝi mem donis la titolon "Fragmentoj de l' vivo kaj pensado", apenaŭ ŝi pensis, ke tiuj ĉi intimaj skribaĵoj estos foje aperigitaj libroforme kaj alparolos milionojn da legantoj en Ĉeĥoslovakio kaj ankaŭ malantaŭ la limoj de nia patrolando kiel valora kaj premana atestaĵo.

Ĉi-supra publikigitaj partoj de la lasta letero de M.K. estas el la unua traduko esperanta, kiam pretigis la anoj de la E-rondeto ĉe ZK ROH Svit Gottwaldov kunlabore kun d-ro J. Černý. La teksto estas en la manuskripto.